

Andreas Künzli (Svislando)

KOMPARAJ RIMARKOJ PRI LA DEVENO, PROFESIO KAJ MOTIVOJ DE KELKAJ ĈEFAJ PLANLINGVAJ AŬTOROJ

Kiel unu el la malmultaj profesiaj lingvistoj, nia altestimata jubileanto, prof. Aleksandr Dmitrievič Duličenko, aktive kaj serioze esploris la demandon de neŭtralaj universalaj lingvoj. Tial, la interlingvistika movado tre ĝojas kaj tre fieras posedi en tiu same fake kiel home elstara tartuano brilan scienciston-slaviston, kiu neniam rilatis indiferece al la interlingvistika afero, sed kiu male engaĝite observis ĝin kun granda intereso kaj kiu publikigis ne malmultajn verkaĵojn, kiuj havas por la interlingvistika scienco nemezureblan valoron. Koran dankon al vi, kara samideano!

La celo kaj senco de ĉi tiu kontribuo estas, krom biografiaj notoj, fari malgrandan analizan komparon inter la deveno, profesio kaj motivoj de kelkaj gravaj planlingvaj kreantoj, listigi la esencan biografion, kaj prezenti kelkajn konkludojn.

1. Germana pastro Johann Martin Schleyer (1831-1912): Volapük (1879)

Johann Martin Schleyer naskiĝis la 18an de julio 1831 en Oberlauda, Badeno, Germanio. Post sia pastrigo Schleyer laboris en diversaj paroĥoj de la ĉefepiskopejo Freiburg i. Br. En 1862 li estis sendita al Messkirch, kaj 1867-75 li aktivis kiel katolika pastro en Krumbach apud Messkirch. En la tempo de “Kulturkampf“ Schleyer predikis kontraŭ la socialismo kaj tial devis pasigi kvar monatan punon en la fortikaĵo de Rastatt. Post sia liberiĝo en 1875 li venis al Litzelstetten apud Konstanz, kie li instaliĝis en la pastra domo, en kiu estiĝis la internacia planlingvo Volapük. En 1885, jam malsana, Schleyer rezignis pri sia laboro kiel pastro en Litzelstetten kaj translokiĝis al la urbo Konstanz mem, kie li mortis la 16an de aŭgusto 1912.

Ĝenerale konata estas la rakonto de Schleyer, kiu en „enigma, sekreto plena maniero, en malhela nokto en la pastra domo de Litzelstetten (...) vikle cerbumis pri ĉiuj stultaĵoj, misoj, malsanoj kaj lamentindaĵoj de nia tempo“. Subite staris antaŭ li la „konstruaĵo“ de lia „mondolingvo kiel tuto antaŭ“ liaj „spiritaj okuloj“. Post tiu memorinda nokta revelacio de la 31a de marto 1879 Schleyer kompilis la gramatikon de Volapük. La unuan skizon li aperigis en aldonaĵo de “Sionsharfe“, revuo fondita de Schleyer. La unua Volapük-lernolibro sekvis en Sigmaringen en 1880.

Malpli sciata estas la fakto, ke la ideo pri universala mondolingvo maturiĝis ĉe Schleyer jam pli frue, nome en Krumbach, kiel la inventinto klarigis en 1888. Dum sia laboro kiel pastro li devis konstati, ke unu el la kamparanoj de sia paroĥo ne sukcesis starigi kontakton kun sia filo en Ameriko, ĉar li erare regis la ortografion. Schleyer kapablis rekonstrui la aŭtentan ortografion kaj restarigi la kontakton. Tiam, „kiel kun fulma potenco“, venis al li la ideoj de monda ortografio kaj monda lingvo.

Sendube, al Schleyer multe helpis lia intereso pri fremdlingvoj. Dank' al studado dum jardekoj li alproprigi al si konojn en 55 lingvoj, kiel Schleyer mem asertis. Kaj Volapük li kreis, sen scii ion ajn pri la verkaĵoj de Leibniz, Wilkins, Bachmeier k.a.

Ĉar Schleyer kredis, ke lia Volapük estas donita de Dio, li tre malfacile digestis kaj suferis, kiam liaj kunbatalantoj volis reformi ĝin kaj kiam post la unua eŭforio la homaro konsideris lian lingvon tro malfacile lernebla kaj rezignis adopti ĝin.

Esenca biografio:

- HAUPENTHAL, Reinhard (2002): Johann Martin Schleyer (1831-1912), Pfarrer von Litzelsteten (1875-1885). Schliengen 2002.
- HAUPENTHAL, Reinhard (2005): Über die Startbedingungen zweier Plansprachen. Schleyers Volapük (1879/80) und Zamenhofs Esperanto (1887). Schliengen 2005.

1. Ruslanda-pollanda juda kuracisto Ludoviko Lazaro Zamenhof (1859-1917): Esperanto (1887)

La devenolando de la planlingvo Esperanto estas la de rusoj okupita Pollando kaj la Rusa Imperio mem. La kreinto de Esperanto, kiu mem difinis sin “ruslanda hebreo”, naskiĝis la 15an de decembro 1859 en la urbo Białystok, tiam apartenanta al la gubernio de Grodno, nuntempe parto de Pollando. Post la vizito de la bjalistoka realgimnazio (1869-73) Zamenhof eniris la filologian gimnazion en Varsovio, kiun li finis en 1879. Poste li studis en la medicina fakultato de la moskva universitato (1879-81) kaj finis tiun studadon en 1885 en Varsovio kun la diplomo de kuracisto. La unuajn paŝojn kiel freŝbakita kuracisto Zamenhof entreprenis en la litova vilaĝo Veisiejai, gubernio de Suwałki. De tie li veturadis al Kaunas, kie li trovis sian edzinon Klara Zilbernik. Post sia plikleriĝo kiel oftalmologo en Varsovio kaj Vieno (1885-86) Zamenhof veturis unue al Ĥerson en suda Rusujo (hodiaŭa Ukrainio), kie li vane serĉis laboron sur sia faka kampo. Tial, li revenis al Varsovio. Inter 1890 kaj 1897 Zamenhof restadis kun sia familio en la regiona ĉefurbo Grodno (hodiaŭa Belorusio), kie li praktikadis sian profesion sub tre malfacilaj kondiĉoj. Zamenhof mortis la 16an de aprilo 1917 en Varsovio, kie li trovis sian definitivan loĝ- kaj laborlokon. Li ne plu povis travivi la proklamon de la ŝtata sendependiĝo de Pollando en oktobro 1918.

Pri siaj ideoj pri la neceso de neŭtrala universala lingvo kaj la motivoj krei tian Zamenhof raportis precipe en letero al la rusa esperantisto Nikolaj Borovko (1896) kaj en alia letero al la franca juristo-esperantisto Alfred Michaux (1905). En la letero al Borovko Zamenhof konfesis, ke la ideo pri komuna lingvo aperis jam „en la plej frua infaneco kaj de tiu ĉi tempo neniam” lin „forlasadis”.

En la sama letero Zamenhof emfazis la gravecon de la rolo, kiun lia naskiĝurbo Białystok ludis: „Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj : rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj ; ĉiuj el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj.” Poste: „(...) oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj, ktp. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon”.

Tiel estiĝis ĉe Zamenhof la revo pri neŭtrala universala lingvo. La unua rezulto de lia planlingvokrea procezo estis lia “lingue universala” (1878) – la esprimon “jam temp' está” la esperantistoj iom ŝerce uzas ĝis hodiaŭ. En la sama tempo la judo Zamenhof okupiĝis pri reformo de la jida lingvo kaj aktivis por la cionismo, fondante cionisman cirkolon. Supozeble Zamenhof ne scipovis 55 lingvojn kiel Schleyer asertis pri si mem, sed kiel 'hobia lingvisto' Zamenhof certe havis realan imagon pri la funkciado de la ĉefaj eŭropaj lingvoj. La "Unua Libro", aperinta la 26a de julio 1887 en Varsovio

sub la pseŭdonima aŭtoreco de d-ro Zamenhof, kaj entananta la gramatikon kaj bazan vortaron de la lingvo Esperanto, estas konsiderata kiel naskiĝdokumento de tiu planlingvo. Kiam Zamenhof eksciis pri Volapük, li estis iom ŝokita pro la ekzisto de konkurento. En la gazeto "La Esperantisto" (1889/90), Zamenhof akre kritikis la ŝlejeran idiomon, kaj la sorto volis, ke la du viroj ankaŭ neniam renkontiĝis, iliaj mondoj estis tro diversaj unu de la alia.

Por Zamenhof Esperanto kaj esperantismo ne estis unuavica celo, sed rimedo al la granda celo: al homaranismo. Kun ĉi-koncernaj ideoj la kreinto de Esperanto publike elpaŝis en 1906 unuafoje en la gazeto "Ruslanda Esperantisto". Sub la titolo "hillelismo" Zamenhof prezentis teorion, kiu formis la kulminon de siaj idealismaj imagoj. Ĝi enhavas fortan religi-socian akcenton kaj en sia kerno estas serĉenda en la talmudo kaj en la judeco de Zamenhof. La hillelismo, poste nomata homaranismo, povas esti tiel karakterizita, ke Zamenhof celis krei "neŭtralan" socion aŭ homaron, surbaze de "neŭtrale-homa" religio, "neŭtrale-homa" etiko kaj "neŭtrale-homa" lingvo, jen la tri iloj, la tri pilieroj por la fina rezulto. Post kiam Zamenhof fiaskis kun sia homaranismo, kiun li volis oficialigi en Ĝenevo, ĉe la esperantistoj jam en 1906, ĉi tiuj adoptis sole la "neŭtralan" lingvon, kiun ili propagandas ĝis nun. Tamen, kelkaj esencaj ideoj de la homaranismo pluekzistas en la tiel nomata "interna ideo" de la esperantismo", pri kiu la esperantistaro tiom fieras kaj kiu tiom diferencas ilin de aliaj planlingvaj kaj etnolingvaj parolkomunumoj.

Esenca biografio:

- PRIVAT, Edmond (1920): Vivo de Zamenhof. Genève 1920.
- ZAMENHOF, Lazaro Ludoviko (1929): Originala verkaro; Kolektitaj kaj ordigitaj de d-ro Joh. Dietterle, Leipzig 1929.
- KLEEF, VAN C. (1965): La Homaranismo de D-ro L.L. Zamenhof. Historia enketo pri la naskiĝo kaj evoluo de la Zamenhofa Homaranismo (el la nederlanda trad. C. Ribot). Marmande.
- HOLZHAUS, A. (1969): Doktoro kaj Lingvo Esperanto, Helsinki 1969.
- MAIMON, N.Z. (1978): La kaŝita vivo de Zamenhof, Tokyo 1978.
- KÜNZLI, Andreas (1991): Interlinguistik und Esperanto im Zarenreich un in der Sowjetunion (Geschichte, Organisation, Ideologie, linguistische und literarische Aspekte. (Lizentiatsarbeit der Philosophischen Fakultät I der Universität Zürich. Kriens/Luzern 1991; unveröffentlicht).

3. Itala matematikisto-logikisto Giuseppe Peano (1858-1932): Latino sine Flexione (1903)

La patrujo de Giuseppe Peano estas la humanista Italio, kie li naskiĝis en kamparana familio la 27an de aŭgusto 1858 en Spinetta ĉe Cuneo en Piemonto. Post la baza lernejo en Cuneo, do ekde sia 12a aŭ 13a jaraĝo, Peano vivis en Torino, kie li eniris la liceon kaj abiturientiĝis en 1876. Samjare li aliĝis al la torina universitato, kie li unue volis studi inĝenieran sciencon. Post la enkonduka kurso pri matematiko li tamen decidis plustudi matematikon. En sia unua studjaro Peano vizitis krom matematiko ankaŭ kursojn pri ornamenta desegnado, projekta geometrio kaj teknika desegnado. 1880-90 Peano kunlaboris kiel asistento de la matematika fakultato kaj funkciis ankaŭ kiel anstataŭanta profesoro. Tiel, Peano ekapartenis al la rondo de famaj italaj matematikistoj kaj fariĝis konata precipe sur la kampoj de logiko, fundamentoj de la

matematiko kaj pli altnivela analizo, kies progreson Peano influis per siaj sciencaj malkovroj. Peano posedis la unikan talenton eltrovi erarojn en la teorioj pri diferenciala kaj integrala kalkuladoj kaj forigi malklaraĵojn en difinoj, pruvante ilin ĉiam per kompreneblaj, konvinkaj kontraŭekzemploj. En la libroj, verkitaj de li, Peano brilis pro sia profunda scio, kaj lia scienca agado pri matematika logiko kaj aksiomoj por la naturaj ciferoj atingis veran kulminon. Inter alie la simbolo ϵ por la elemento de kvanto estis enkondukita de Peano. Fakte li estis la unua, kiu kompilis plenan matematikan sistemon per simboloj. Tio tiam estis revolucia afero. En 1890 li malkovris la spacoplenigan kurvon. Iom post iom, Peano trovis respekton kaj agnoskon de siaj kolegoj. En 1891 li estis nomita eksterordinara profesoro, en 1895 sekvis lia nomumo kiel ordinara profesoro. En 1897 Peano partoprenis la unuan internacian matematikistan kongreson en Zuriko (Svislando), kie li elpaŝis kiel ĉefpreleganto. Krome, Peano agadis ankaŭ kiel eldonisto de sciencaj periodaĵoj. En 1900 Peano vizitis, kadre de la Monda Ekspozicio en Parizo, la unuan internacian filozofian kongreson kaj la duan matematikistan kongreson. Dum tiuj kongresoj estis pridisputata ankaŭ la demando de la neŭtrala universala planlingvo. Ĉefe Louis Couturat (1868-1914), franca filozofo-matematikisto kaj Leibniz-eldonisto, pledis por la efektivigo de tia lingvo. 1900 estas ankaŭ la jaro de la starigo de Délégation pour l'adoption d'une Langue Auxiliaire Internationale, kies fondintoj Louis Couturat kaj Léopold Leau (1868-1943), alia signifa franca matematikisto, verkis la monumentan libron “Histoire de la Langue Universelle“ (1903).

Kiel aŭtoroj de la reformlingvo Ido, prezentita en 1907, estas konsiderataj krom Louis Couturat ankaŭ la franca teologo kaj eks-esperantisto Louis de Beaufront (1855-1935); la reformprojekton apogis ĉefe la dana filologo Otto Jespersen (1860-1943), la viena fizikisto Richard Lorenz (1863-1929) kaj la germana kemiisto kaj nobelpremiito Wilhelm Ostwald (1853-1932). La idistoj estis kulpigataj de la esperantistoj pro la efektivigo de skismo de la zamenhofa lingvomovado. Tiu skismo neniam povis esti venkita, kaj la esperantistoj neniam vere pardonis al la idistoj tiun 'pekon'. Giuseppe Peano kaj Otto Jespersen, aŭtoroj de Latino sine Flexione (1903) kaj Novial (1928 resp. 1934), kiuj travivis la Ido-krizon, malkonsentis kun Couturat kaj iris sian propran vojon.

Ĝis 1903 maturiĝis do la ideo de Peano krei simpligitan latinon kiel internacian inter-lingvon por la sciencistoj, speciala movado laŭ ekzemplo esperantista ne estis antaŭvidita. La italo estis konvinkita, ke la tempo de la latina lingvo forpasis. Per sia Latino sine flexione Peano kreis do alternativan latinon sen gramatiko, sen fleksio. Li kredis, ke la plej bona lingvo estas lingvo sen gramatiko. Li ankaŭ ne celis inventi novajn vortojn, sed ĉerpi ilin el la okcidenteŭropa vortrezoro. La admiranto de Newton neniam pretendis, ke li mem havis tiun ideon, sed atribuis tiun meriton al Leibniz, aplikante liajn sugestojn.

Ŝajnas, ke ĉe Peano la intereso pri neŭtrala helplingvo ekestis jam en 1889. En 1900 Zamenhof skribis pri Peano kiel “kapabla esperantisto”, la du viroj renkontiĝis finfine en 1906. En 1908 Peano estis elektita kiel direktoro de la disfalinta Volapük-Akademio, kiu en la periodo 1893-1902 lanĉis la planlingvon Idiom Neutral, kaj kiu portis ekde 1910 la titolon Academia pro Interlingua, kaj li restis ĝia estro ĝis 1932, la jaro de lia morto. Okaze de la kvina matematikista kongreso en Kembriĝo, Anglio, Peano eldiris nenion plu signifan pri sia fako mem, sed des pli arde propagandis la lingvon Latino sine Flexione, kiun li nomis nun 'Interlingua'. En realeco, Interlingua de Peano apenaŭ diferencigis de Latino sine Flexione. Kiam Peano deziris publike prelegi en Interlingua, la kongreso malpermesis al li tion, kaj Peano retiriĝis seniluziigita. Ĉesante ankaŭ la provon varbi por Interlingua en la Akademio de Sciencoj en Torino, Peano dume ree dediĉis sin al matematikaj esploroj.

Dum la unua mondmilito Peano konstatis, ke unu el la ĉefaj kialoj de la milito estas la ekzisto de lingvaj limoj, ke la diverseco de la lingvoj malfaciligas la interkompreniĝon kaj interkonatiĝon kaj ke la lingvaj diferencojn akcelas la troigita patriotismo. Tial, Peano postulis la pli efikan kunlaboron inter Anglio, Francio, Italio kaj Ruslando. Kiel modelon por demokratio li nomis Svislandon, kiu bonege funkcias malgraŭ plurlingveco. En la ĉi-rilataj konsideroj li evidente alproksimiĝis al la porpaca sinteno de L.L. Zamenhof kaj Auguste Forel, alia grava adepto de la ideo de la neŭtrala universala planlingvo. Okaze de proksima matematikista kongreso en Toronto, Kanado, en 1924, de kiu Peano estis speciale invitita, Peano finfine rajtis prelegi en Latino sine flexione. Tamen, jam tiam la plimulto de la delegitoj komprenigis al la senrevigita eŭropano, ke sendube la angla transprenis la rolon kiel mondlingvo. La fondo de International Auxiliary Language Association (IALA) iom konsolis lin en tiu jaro. Interlingua de IALA (vd. sube), kiu tre similas al Latino sine flexione de Peano, estis publikigita en 1951, do du jardekojn post la morto de Peano, kiu okazis subite la 20an de aprilo 1932 en Torino.

Esenca bibliografio:

- KENNEDY, Hubert: Giuseppe Peano. Deutsche Übersetzung von Ruth Amsler. Dem Andenken an Ugo Cassina gewidmet. San Francisco 2002.
- BARANOVSKÁ-FRANK, Věra: De Latino Sine Flexione Centenario. Ein Jahrhundert Latino sine Flexione. In: grkg Humankybernetik. Band 44, Beiheft 2003. Institut für Kybernetik / Akademia Libroservo, Paderborn 2003.

4. Ruslanda estonia baltgermana fizikisto-matematikisto Edgar de (von) Wahl (1867-1948): Occidental/Interlingue

Edgar de Wahl (la patro nomis sin von Wahl) naskiĝis la 11an de aŭgusto 1867 en Bogopol, Podolio, Ukrainio (Ruslanda Imperio). 1876-86 li frekventis la gimnazion en Sankt Peterburgo kaj poste la fakultaton fizika-matematikan en la sama urbo. Sed li sekvis ankaŭ kursojn en la fakultatoj pri filologio kaj orientaj studoj, precipe pri filologioj romanidaj, hispana kaj antikva egipta. Poste li laboris en la Arta Akademio, sekcio arkitekturo kaj desegnado kaj akiris la diplomon de instruisto pri desegnado. En 1892 li engaĝiĝis en la marista armeo de Ruslando kiel subleŭtenanto kaj servis sur diversaj militŝipoj. Tiu servado kondukis lin ĝis Ameriko. Post kiam li forlasis la mararmean servadon, li laboris en la Fizika Observatorio de Peterburgo. Pli poste, li ekinstruis fizikon kaj matematikon en la reala lernejo de la najbara urbo Reval (Tallinn) en Estonio, dum mallonga tempo ankaŭ desegnadon en la komerca lernejo. Krome, li okupiĝis pri sporto. Ŝajnas, ke lia profesia aktiveco estis tre sukcesa, ĉar oni ŝatis lin ankaŭ pro lia humursento. En Reval li edzinigis la filinon de la persona kuracisto de la granddukino Maria Pavlovna kaj havis kun ŝi tri filojn kaj unu filinon. En 1913 lia edzino forlasis lin, kaj unu jaron poste de Wahl elektis la duan edzinon, kun kiu li havis unu filinon. Dum la rusa-japana milito (1904-05) li estis denove mobilizita al la marista armeo, post tio li daŭrigis sian instruistan aktivecon en Reval. Inter 1911 kaj 1917 de Wahl estis ankaŭ deputito de la germanlingvanoj en la urba konsilio de Reval. En 1916 de Wahl servis kiel oficiro sur militŝipo por la transporto de soldatoj.

De Wahl estis lingvotalentulo: jam en sia frua aĝo li parolis la germanan, rusan, estonan kaj francan lingvojn, kaj en la lernejo li studis la latinan, grekan kaj hispanan lingvojn. Tra kolego de lia patro, W.K. Rozenberger, de Wahl konatiĝis kun la lingvo

Volapük. Pri Esperanto li rezignis jam en 1894 post la memorinda voĉdonado, kiu negative finiĝis por ĉiuj, kiuj postulis reformojn en la lingvo Esperanto. Tiam de Wahl ŝanĝis sian konvinkon en la naturalisman direkton. En 1909 li kreis la efemeran planlingvan projekton Auli.

En 1922, jam en la sendependa Estonio, de Wahl fondis la revuon "Kosmoglott", en kiu li publikigis la sistemon Occidental, en kiu li vidis esti realiĝinta la maksimumo de naturalismo kaj internacieco en planlingvo. Tio okazis ĝuste en la tempo, kiam Ligo de Nacioj diskutis en Ĝenevo la demandon de internacia helplingvo (Gonzague de Reynold kontraŭ Edmond Privat), kun aparta konsidero de Esperanto. Ĝis 1940 de Wahl plene dediĉis sin al la aktiveco interlingvistika, eldonante la revuon "Cosmoglotta", havante la plezuron, ke liaj klopodoj alportas fruktojn. En 1947 Occidental ricevis la nomon Interlingue por substreki la universalan ambicion de la lingvoprojekto kaj ĉar oni kredis, ke tiel ĝi estus pli bone akceptita ankaŭ en la komunistaj landoj. Post 1940 la persona situacio de de Wahl draste malboniĝis. Pro la okupacio de Tallinn far la sovetia armeo, la edzino de de Wahl malaperis (estis deportita), kaj la occidentalistoj komencis ricevi nur malmultajn leterojn de sia majstro. De Wahl vivis sola, kun reduktitaj fizikaj fortoj, kaj bombo eĉ detruis parton de sia riĉa biblioteko, tiel ke liaj manuskriptoj forbruliĝis. En la tempo de la nacisocialisma okupado de Estonio de Wahl eĉ estis enkarcerigita laŭdire pro kontraŭhitlera sinteno aŭ eldiro. Ŝajne li nomis la germanan reĝimon „Termitenstaat“ (t.e. ŝtato de termitoj), al kiu li ne volis submetiĝi. Poste li translokiĝis al sanatorio por nervaj malsanuloj ekster la urbocentro, kie li mortis la 9an de marto 1948 kaj estis entombigita en la tombejo Aleksandr Nevski, kie lia tombo estas konservita ĝis nun.

Esenca bibliografio:

- Cosmoglotta 203/1958.
- <http://www.interlingua.fi/gow.htm#Wahl>
- MATEJKA, Alphonse: Vollständiger Lehrgang in Interlingue der natürlichen Welthilfssprache. Für Millionen geschaffen, von Millionen verstanden. St. Gallen 1955.
- BLANKE, Detlev: Internationale Plansprachen. Eine Einführung, Berlin/DDR 1965, p. 161 kaj sekvaj.
- KÖKÉNY, L., BLEIER.V.: Enciklopedio de Esperanto. Budapeŝt 1933, p. 571.

5. German-usona lingvisto: Alexander Gottfried Friedrich Gode-von Aesch (1904-1970): Interlingua-IALA

Alexander Gode naskiĝis en 1904 en Bremen (Germanio) kiel filo de patro nordgermana kaj de patrino svisa. Gode faris siajn studojn en Vieno, Parizo (Sorbonne) kaj Novjorko (Columbia Universitato). En 1927 li translokiĝis al Usono, kies civitano li fariĝis. En 1939 li doktoriĝis pri germanistiko en Columbia Universitato, por instrui modernajn lingvojn, romanidajn kaj ĝermanajn. Plurajn librojn li publikigis. Inter 1943 kaj 1946 li aperigis, kun E. Clark Stillman, la serion "Spanish at Sight", "French at Sight" kaj "Portuguese at Sight". En 1941 li eldonis 300 paĝojn pri "Natural Science in German Romanticism". En 1946 li fondis la eldonejon Storm Publishers, kiun li gvidis.

Pri interlingvistiko Gode ekinteresiĝis en 1934. En 1946 li fariĝis esplordirektoro de International Auxiliary Language Association (IALA), post André Martinet. Kiel konate, ĉi tiu organizo, starigita de Alice V. Morris kaj Dave Hennen

Morris en 1924, estis la kadra motoro por la publikigo de Interlingua, kvankam la ĉefa klopodo certe apartenis al Gode, kiu estis la ĉefredaktoro de “Interlingua-English Dictionary” (1951) kaj la kunaŭtoro de “Interlingua Grammar” (1951), la ĉefaj referencaj libroj de Interlingua. Post la likvido de IALA en 1953, Gode transprenis la gvidon de Interlingua Division of Science Service en Novjorko ĝis 1967.

Krom tio Gode estis inter la fondintoj kaj la unua prezidanto de la Asocio de Tradukistoj de Usono kaj redaktis la revuon “Translation Inquires”, kiu akiris famon inter tradukistoj. Pro sia aktiveco, Gode ricevis plurajn honorajn premiojn, inter kiu menciindas Harald Swanberg Distinguished Service Award de American Medical Writers' Association pro siaj elstaraj kontribuoj en medicinaj revuoj kaj pro resumoj en Interlingua. La premion de la Federacio Internacia de Tradukistoj li ricevis ĵus antaŭ sia morto, okazinta la 10an de aŭgusto 1970. En siaj lastaj jaroj li ĉefe tradukis sciencajn tekstojn nome de sia firmao Interlingua Translations.

Esenca bibliografio:

- Currero, No. 22/1970
- <http://www.interlingua.com/historia/biographies/gode.htm>
- <http://www.interlingua.fi/gow.htm>

Kelkaj konkludoj

Ĉi tiuj biografiaj skizoj sufiĉas por karakterizi la aŭtorojn de la planlingvoj Volapük, Esperanto, Latino sine flexione, Occidental kaj Interlingua kaj por ricevi impreson pri iliaj intencoj rilate la sencon kaj esencon de la planlingva kreado.

Laŭ la geografia deveno, Schleyer, Peano kaj Gode estis 'okcidentanoj', dum Zamenhof kaj von Wahl kreskis kaj vivis en orienta Eŭropo, fakte en la Ruslanda Imperio. Zamenhof estis liberala judo, dum von Wahl apartenis al la kulturtradicio de la baltaj germanoj.

Laŭ ilia profesia klereco, nur Gode estis profesia lingvisto, en tiu kategorio oni povas aldoni Otto Jespersen. Peano kaj Couturat reprezentis diversajn sciencajn fakojn, ne disponigante profesion lingvistikan klercon, sed la kapablon je scienca laboro. Schleyer, Zamenhof kaj de Wahl apartenis al la kategorio de kleruloj, kiuj okupiĝis pri altnivelaj profesioj kaj kiuj estis poliglotoj, sed kiuj ne povis esti konsiderataj kiel sciencistoj en la klasika senco (GOLDEN, LF 66/1981; BLANKE, Internationale Plansprachen, 1985, p. 72-73). Estas signife, ke ĉiuj planlingvaj aŭtoroj post sia ekinteresiĝo pri planlingva kreado kaj la publikigo de sia projekto verve laboradis super la disvastigo de sia lingvo, riskante kvazaŭ tute neglekti sian profesion laboron. Kiam ili konstatis, ke la 'mondo' ne tiom rapide akceptas ilian lingvon kiel ili kredis, ili rapide seniluziiĝis, perdis la fizikajn kaj psikajn fortojn. Kiel Schleyer ankaŭ de Wahl fariĝis 81-jaraĝa, Zamenhof estis 57-jara kiam li mortis, Peano tiam havis 74 jarojn, kaj Gode troviĝis en sia 66a jaro.

Interesaj estas la motivoj de la unuopaj lingvokreantoj. Ĉe Schleyer la lingvo Volapük (world speak) estis havigita pere de speco de dia revelacio, “pro amo al ĉiuj homoj, kiuj devas vojaĝi tra la mondo kaj kiuj devas korespondi kun homoj en aliaj landoj”. Por Zamenhof, Esperanto estis rimedo de siaj penoj por plibonigi la mondon, por atingi la grandan celon, nome la kreadon de la “neŭtrale-homa” civilizo, kiel Zamenhof esperis. Lia konvinko pri la neceso de neŭtrala universala lingvo fontas en la problemoj de la kunvivado de plej diversaj etnoj kaj religioj, tipa por Orienta Eŭropo.

Kiel HAUPENTHAL (2005), ĉefa fakulo pri Volapük, konkludis, la vojo al la planlingvo estis por Schleyer do la rezulto de racia sinteno kaj analiza agado. La ago de la kreo mem estis intuicia kaj spontana. Kaj ĉe Volapük kaj ĉe Esperanto la persona religia faktoro de la aŭtoroj ludis ian rolon, dum iuj (ekzemple Wilhelm Wunsch en B. Kotzin, Historio kaj teorio de Ido) opiniis, ke ĉe la Ido-alternativo rolis verŝajne ankaŭ antisemitismaj sentoj. Almenaŭ Ido povas esti karakterizita kiel Esperanto sen homaranismo, sen akuzaktivo kaj sen supersignoj. Peano kaj Gode celis tute pragmate enkonduki 'teknikan' planlingvon por la sciencistoj kaj do interesiĝis evidente nur pri la praktika valoro de helplingvo. Tamen, estas vere, ke Peano iom post iom adoptis la idealismajn pacideojn kontraŭmilitajn de Zamenhof. Occidental de von Wahl, kiu supozeble estis ankaŭ iom influita de la germana 'kleriga misiemo' devintus servi kiel "latino por ĉiuj", precipe por la kleraj homoj vivantaj en la okcidentaj, ĉefe romanidaj landoj. Tiusence la nomo de la lingvo (kiun en 1947 estis eknomita Interlingue) estis samtempe ĝia programo. Ŝajnas ankaŭ, ke la lukto inter Occidental kaj Esperanto, kiun de Wahl ĉiam konsideris kiel plej gravan konkurenton, estis iel ligita kun la antagonismo inter okcidenta kulturo kaj oficialiĝanta bolŝevismo en oriento kaj do havis politikan dimension. Kontraŭ la barbarigo de la kulturo de Wahl celis kvazaŭ reagi per invento de planlingvo kreita plene en la senco de la okcidenteŭropa kulturspirito.

Kronologie, la ĉi tie preparolitaj ĉefplanlingvoj aperis laŭ jena vico: Volapük (1879), Esperanto (1887), Latino sine Flexione (1903), Ido (1907), Occidental (1922), Interlingua (1951). Rilate la gradon de la kreskanta naturalismo (en la senco de la inverso de la 'artefariteco'), sed lingvistiko en ĉi tiu kontribuado ne estis la unuavica temo, la ĉi tie menciitajn planlingvojn oni povas listigi, provizore, laŭ jena vico: Volapük, Esperanto, Ido, Latino sine Flexione, Occidental, Interlingua. La du vicoj pli malpli kongruas, kio eble permesus fari novajn konkludojn.